

Internacia Esperanto-Konferenco en Vieno

19. - 24. de majo 1934.

Th. Kilián.

Ne konsiderante la amuzan parton, ni povas diri, ke niaj Universalaj Kongresoj kaj gravaj konferencoj sekvas du celojn, nome publika propagando kaj interna laboro.

Esperanto ne ŝatas esceptojn kaj tial ankaŭ la Internacia Esperanto-Konferenco en Vieno, okazinta en majo de tiu ĉi jaro ne faris escepton el la regulo. La prepara komitato plene sukcesis doni al la konferenco la brilon de oficialeco kaj per tio interesigi pri nia movado la gazetaron, kiu alportis pri niaj kunsidoj detalajn raportojn; kiu gajnas la gazetaron, gajnas la publikon.

La prepara komitato sukcesis interesigi por la konferenco la gvidantajn virojn de Aŭstrujo. Aktiva ministro, s-ro Fritz Stockinger, bonvenigis en germana kaj parte eĉ en esperanta lingvo la konferencon, dezirante al ĝi plenan sukceson. Grava kaj ĝojiga estas lia publika deklaro, ke li estas amiko de esperanto kaj ke li ĉie kaj ĉiam subtenos niajn klopodojn. Ne estas mirige, ke tiun ĉi deklaron sekvis longedaŭra aplaŭdo de la tute plena ĉambrego de l'parlamento. Tre gravas, ke s-ro Stockinger, kiu estas ministro por komerco, venis al tiu ĉi decido per tre reala kaj praktika rezonado. Ne la Interna Ideo de esperanto allogas lin, sed, kiel li mem diris, la ebleco helpi morale kaj ekonomie al sia popolo kaj ŝtato per vigligo de la fremdultrafiko. Tiu ĉi sincera klarigo estas grava atesto por la rolo, kiun nia movado ludas jam nun en la interpopola vivo.

Krom la nomita ministro ĉeestis la solenan malfermon multaj aliaj oficialaj reprezentantoj de la urbo Vieno. La malfermon de la konferenco sekvis senfina vico da salutoj de diplomataj kaj de oficialaj reprezentantoj de 6 radio-stacioj, 12 komercaj ĉambroj, 20 industriaj kaj komercaj organizaĵoj, 6 foiroj, 2 policaj organizaĵoj, 25 banlokoj, 20 turistaj organizaĵoj, 15 universitatoj kaj aliaj altaj lernejoj. Entute parolis reprezentantoj el 22 ŝtatoj. Kiel unua en tiu ĉi longa vico parolis amiko de nia majstro, universitata profesoro kaj estinta rektoro de la Krakova universitato d-ro Odo Bujwid, profesoro, estimata kiel scienculo, viro, kiel afabla paĉjo amata de ĉiuj, kiuj havas la feliĉon, persone koni lin.

Neoble estis finparoligi la longegan serpenton da reprezentantoj. Por gajni tempon por la laŭprogramaj parolontoj oni metis parton da ili sur la programon de la sekvonta tago. Post la majstre parolita festprologo de s-ro Psenner sekvis parolado pri "Esperanto en lernejo" de kortega konsilisto d-ro Franz Wollmann, en kiu montris la edukajn kvalitojn de esperanto-instruado. Estu permesite citi almenaŭ unu frazon el lia rimarkinda parolado. Li diris: "Kie kaj kiam ajn estis skribita io granda kaj bela kun valoro eterna, tio estu tradukata de la anoj de la koncernaj popoloj esperanten, por ke la esperantisto povu ĝui la majstrajn verkojn de la mondliteraturo kaj por ke el tiu universaleco de la esperanto-literaturo estiĝu la spirito de reciproka estimo kaj frateco, kiu serĉas nur, kio nin ligas sed ne disigas, kiu disrompas la murojn inter la nacioj, ĉar ni ĉiuj ja estas anoj de unu granda sorta komunumo, ĉar ni estas homoj, kreitaj laŭ la modelo de dio."

Vere, pli bele oni ne povus difini la idean fundamenton de nia movado. Jes, interpopola, kultura komunumo, ampleksanta la homaron, estas nia celo.

Profesoro de teknika altlernejo inĝeniero Petritsch, parolis pri la temo "Esperanto, scienco, kaj tekniko" el vidpunkto de praktika teknikisto.

La propagandan parton de la konferenco ni karakterizos plej trafe se ni diros, ke ĝi staris en la signo de oficialeco, pompo kaj festparoladoj. Kvankam nia movado estas pure demokrata, tamen ni tute ne taksu tro malalte tiun ĉi pompon, kiun kronis aŭdienco, en kiu la federacia prezidanto s-ro Miklas akceptis la reprezentantojn el 22 ŝtatoj, kaj la invito al teo flanke de la ministro por instruado kaj nuna kanceliero d-ro Schuschnigg, kiun ĉeestis ankaŭ la mortinta federacia kanceliero d-ro Dollfuss kaj la ministro por komerco kaj favoranto de esperanto s-ro Stockinger.

La alia flanko, multe pli modesta, sed neniel malpli grava, portas grandlitere la surskribon: LABORO. La sekvantaj tri tagoj klare montris la paciencon kaj persistan laboron de nia "diligenta kolegaro". La raportojn kaj la viglajn debatojn oni povas kunigi sub la titolo: Esperanto en la lernejo kaj praktiko. Ili montris, en kiuj rondoj esperanto estas uzata aŭ uzota: inter instruistoj kaj komercistoj, inter policianoj kaj fervojistoj, en scienco kaj arto, en radio kaj turismo . . . per unu

vorto: ĉie. Neeble estas doni eĉ koncizan resumon de la raportoj kaj debatoj. Estu permesite menciigi nur la raportojn de reprezentantoj el Ĉeĥoslovakujo, nome la interesan raporton de la ministeria konsilisto s-ro Jan Honzl. Pro liaj aprobitaj vortoj kaj speciale pro lia promeso subteni en la ministerio niajn klopodojn, ni esperantistoj ŝuldas al li sinceran dankon. En sia interesa raporto ĉerpis s-ro inĝeniero Scholze, kiu prezidis la konferencon dum la labortagoj, el siaj riĉaj spertoj kiel profesoro instruanta esperanton en sia lernejo. Sekvis detala raporto pri la peresperanta agado kaj pri la celoj de nia radio-stacio, kiun oficiale reprezentis mi havis la honoron. La atento, kun kiu la raporto estis aŭskultata kaj la longdaŭra aplaŭdo, kiu ĝin sekvis, estas konvinkiga pruvo pri la simpatio, kiun ĝuas nia stacio en eksterlando. Tiu ĉi simpatio estas la plej ĝojiga rekompenco por nia laboro.

La 23-an de majo vespere parolis reprezentantoj de 16 nacioj en la Viena radio-stacio. Ĉiu diris du-tri frazojn unue en sia gepatra lingvo kaj poste en esperanto. La aranĝo certe bone impresis la aŭskultantojn frappe pruvante la disvastiĝon de esperanto.

Sinjoroj kaj sinjorinoj!

Finiĝis la festotagoj, kiuj montris riĉan rikolton de l' laboro farita kaj komenciĝis tagoj de l' laboro farota. Nova espero plenigas niajn korojn, kuraĝiga estas la firma konvinko: Esperanto atingos sian celon, ĉar la homaro bezonas ĝin.

Tiun ĉi parton de mia parolado mi prenis el la gazeto Ligilo, aperanta en Prostějov, Ĉeĥoslovakio, kiu aperigis kiel unua esperanta gazeto plenan raporton pri la konferenco, tri tagojn post ĝia finiĝo.

Sinjorinoj kaj sinjoroj! Je la fino de mia parolado, permesu, ke mi turnu vian atenton al raporto pri tre grava eksperimento. Temas pri la knabina gimnazio en Bishop Auckland en Anglujo.

La lernantinoj de tiu ĉi lernejo devas jam en la unua klaso decidiĝi por unu fremda lingvo: aŭ por la franca aŭ por la germana. La rezulto de senlaca laboro flanke de la instruistinoj kaj lernantinoj estis post du jaroj - kiel ĉie - tre nekontentiga. Eĉ malpli kontentiga ol en aliaj ŝtatoj, ĉar speciale por Anglo la gramatiko de fremdaj lingvoj estas eksterordinare malfacila. Anglon, kies lingvo havas tre simplan gramatikon, embarasas la multeco da reguloj kaj la riĉeco da esceptoj en la gramatiko de fremdaj lingvoj. Ne estas do mirige, ke sinjorino doktorino Fisher, la estrino de la lernejo, ne estis kontenta kun la rezultoj en la komenc-klasoj.

Post vana klopodado plifaciligi al la lernantinoj la studadon per diversaj rimedoj, ŝi ekpensis, prepari la studantinojn al la malfacilaj franca kaj germana lingvoj per studado de la facila esperanto. Al tiu ĉi decido gvidis ŝin la konata sperto, ke la plej grandajn malfacilaĵojn faras la studado de la unua fremda lingvo, kaj ŝi ĝuste konjektis, ke oni devas do unue instrui la plej facilan lingvon. Profesorino sinjorino Edwards, kiu al mi perletere sciigis multajn tre interesajn detalojn pri la eksperimento, do profesorino Edwards tuj ekstudis esperanton, ĉar ĝis tiam neniu el la profesorinaro de la lernejo interesiĝis pri esperanto. Tiu ĉi fakto estas tre grava, ĉar ĝi pravas, ke ne entuziasmo por esperanto, sed logika rezonado rezultigis la enkondukon de esperanto en la lernejon.

Do, la lernantinoj studis la unuan jaron devige esperanton, la duan jaron francan aŭ germanan lingvon kaj ni diru tuj, ke la rezulto estis neatendite bona. Dum unu sola jaro la studantinoj progresis en la franca kaj germana lingvoj multe pli ol antaŭe dum du jaroj.

Tiun ĉi eksterordinare kontentigan rezulton klarigas la direktorino per la klara konstruo de la esperanta gramatiko nekonanta esceptojn kaj per la logika vortfarado. Tiuj ĉi ecoj de esperanto ebligas ankaŭ al studentoj por lingvoj malpli talentaj, enpenetri en la esencon ne nur de esperanto, sed en la esencon de lingvo ĝenerale.

Profesorino Edwards substrekas ankaŭ la psikologian flankon de la eksperimento, ĉar ankaŭ ĝi forte pledas por esperanto kiel unua fremda lingvo: la ordinara embaraso ĉe studado de fremda lingvo cedas ĉe studo de esperanto al ĝojo pri sukceso kaj tiu ĉi ĝojo vekas memfidon, kiu poste transiras al la franca kaj germana.

Tiun ĉi eksperimenton, kiun oni praktikas jam de post la jaro 1919, do dekkvin jarojn, mi opinias tre grava, ĉar ĝi montras al ni la pordeton, tra kiu ni povas enpenetri en la lernejon, ne en

unu aŭ du kiel ĝis nun, sed en ĉiujn lernejojn.

"Esperanto-helplingvo" estu ankaŭ tie ĉi nia devizo.

Estimataj gesinjoroj!

Mi havas la honoron reprezenti la Tutmondan Asocion de Geinstruistoj Esperantistaj. En ĝia nomo mi salutas la kongreson kaj deziras al ĝi plenan sukceson.

Mi uzas tiun ĉi okazon por atentigi vin al nia asocio. Speciale mi atentigas la ĉeestantajn kolegojn instruistojn kaj profesorojn kaj invitas ilin al kunlaboro, ĉar nur per forta instruista asocio ni konkeros la lernejojn kaj per ĝi la mondon.